



“ONI MIN ARESTIS KIEL AVERTO POR LA FREMDAJ VIZITANTOJ”

Eduardo Izarzugaza. Brigadisto.

Turkio ne volas, ke la vizitantoj informu pri la situacio en Kurdio, laŭ Izarzugaza. Li vojaĝis al Kurdio kun la intenco vidi la konsekvencojn de la konflikto, sed pasintan semajnon(*) oni lin arestis kaj deportis.

Pasintan ĵaŭdon(*) la turka polico arestis en Kurdio la brigadiston Eduardo Izarzugaza (Oĉandio(1), Biskajo, 1970). Oni lin deportis kaj sabate li alvenis en Eŭskion.

Kun kiu celo vojaĝis la brigadistoj al Kurdio?

Ni iris al Amedo(2) por la Noruzo(3) kaj havis programon por la postaj tagoj sed, ĉar la situacio tre malbonis, ni devis improvizi. Ni volis iri al Nisebino(4). Tiu urbo estis sieĝita kaj nun estas detruita. La intenco estis trovi iun kontakton, vidi la urbon, foti, kaj poste, tie ĉi, verki artikolojn por informi pri la situacio. Sed en Nisebino estis neniu kaj ni decidis iri al Liĝo(5).

La armeo ĵus estis operacinta en Liĝo.

Ni havis amikon tie kaj sciis, ke la armeo estis plenumanta operacon kun 10 000 soldatoj kaj estis okupinta la urbon. Ni sciis, ke ili mortigis kelkajn civitanojn kaj arestis aliajn kaj volis kompili atestojn. Kiam ni tien iris, la armeo estis retiriĝanta kaj ni vidis ĝin flanke de la ŝoseo kun armiloj kaj mindetkiloj. Sed en Liĝo estis amaso da policistoj. De la unua momento ili postspuris nin, petis niajn pasportojn, demandis, kion ni estis farantaj tie... Ni diris ke ni estis turismantaj, ĉar nia amiko havis domon tie. Ankaŭ la polickomisaro venis por nin pridemandi. Ni ne havis problemojn, sed la tutan tempon ili postgvatis nin.

Ĉu vi parolis kun iu?

Ni estis kun homo, bankisto. Li rakontis al ni, kiel li restis enhejme dum dekkvin tagoj sen povi eliri kaj kiel lia nevo mortis pro perdita kuglo de la armeo. Sed ni rimarkis ke, flanke de la polico, ni ne estis bonvenaj kaj ni decidis forlasi la urbon kaj reveni Ameden.

Oni cin arestis dum la reveno.

En la enirejo de Amedo estis polickontrolo. Oni elirigis nin el la kamioneto kaj nin disigis laŭ la sekso. Oni petis niajn poŝtelefonojn kaj ni klopodis forviŝi la fotojn faritajn dum la Noruzo, sed ne sufiĉis la tempo. Tiam oni komencis diri, ke ni devas iri al la policejo sed, kataluno kiu estis inter ni asertis ke ni rajtis voki nian ambasadejon; ĉar kun ni estis italo kaj kolombiano temis pri tri ambasadoj kaj ili eknervoziĝis. Tiam, policano ekvokis min turke, min kaptis kaj enirigis en veturilon.

Ĉu oni klarigis pro kiu motivo?

En la policejo ĉiuj parolis turke kaj mi demandis al ili, ĉu mi estas arestita. Ili diris, ke ne, sed ke oni komencos enketon rilate min.

Vi ne estis arestita sed ne povis forlasi la lokon, ĉu?

Poste venis al la policejo amiko mia kaj klarigis, ke mi estas “sub la gardado de la polico”.

Kio distingas tion disde aresto?

Praktike, temas pri aresto. Oni ne povis meti min en ĉelo kaj oni tenis min en seĝo. La venontan tagon alvenis advokatoj kaj rakontis ke la polico estis enketinta kaj ne sciis kion fari pri mi. Tiel oni asertis al mi. Mi demandis al ili, ĉu estas akuzo kontraŭ mi kaj ili respondis, ke oni atribuis al mi “disdonadon de propogando de la PLK(6)”. Oni juĝis min kaj la prokuroro petis absolvon. Sed la polico venis kaj denove min forportis, ĉar la prokuroro ankaŭ postulis deportadon. Ni estis forvojaĝontaj dimanĉe kaj oni informis min, ke ĝis tiam mi devos resti en la policejo. Sed mi diris al miaj geamikoj, ke mi ne volas resti unu tagon kaj duonon pli en la policejo; iuj policistoj montris sin tre atakemaj, ili volis min timigi simulante ke ili batas min; tial, mi pensis, ke fine iu el ili batos min. Do, oni aĉetis mian flugbileton por la posta tago.

Kian politikan situacion vi trovis?

Oni troviĝas en la kampanjo por la referendumo de la 16a de aprilo(*). Erdogan volas trudi prezidentisman sistemon por establi totalisman reĝimon. La jeso aŭ la neo estas en la manoj de la kurdoj kaj li strebas disvastigi la teroron por ke ili ne iru baloti. Turkio ne volas, ke oni informiĝu pri tio kaj, kiel averto por la fremdaj vizitantoj, oni arestis min. Povus esti iu ajn alia.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

- (1) Otxandio, en la eŭska.
- (2) Amed (Diyarbakir en la turka).
- (3) Newroz.
- (4) Nisêbîn (Nusaybin en la turka).
- (5) Licê.
- (6) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).

KLARIGOJ:

Intervjuo de Mikel Rodriguez originale aperinta en la eŭska ĵurnalo Berria la 29-an de Marto 2017-a.

Tradukis: NXC. Aprilo 2017-a.

Provlegis: DS kaj AA.

